

MEDITADO

surbaze de la Evangelio laŭ Sankta Johano 6, 22-29

22 La sekvantan tagon, kiam la homamaso, kiu restis trans la maro, vidis, ke nenia ŝipeto estas tie krom unu, kaj ke Jesuo ne eniris kun la disĉiploj en la ŝipon, sed la disĉiploj solaj veturis 23 (venis tamen ŝipetoj el Tiberias proksime al la loko, kie oni manĝis la panon, post kiam la Sinjoro donis dankon) - 24 kiam do la homamaso vidis, ke Jesuo ne estas tie, nek liaj disĉiploj, ili ankaŭ eniris la ŝipetojn kaj veturis al Kapernaum, serĉante Jesuon. 25 Kaj trovinte lin trans la maro, ili diris al li: Rabeno, kiam vi venis ĉi tien? 26 Jesuo respondis al ili kaj diris: Vere, vere, mi diras al vi: Vi min serĉas, ne ĉar vi vidis signojn, sed ĉar vi manĝis el la panoj kaj satiĝis. 27 Laboru ne por la pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi; ĉar lin Dio, la Patro, sigelis. 28 Ili do diris al li: Kiel ni agu, por ke ni faru la farojn de Dio? 29 Jesuo respondis kaj diris al ili: Jen la faro de Dio: kredi al tiu, kiun Li sendis.

El la fragmento de la Evangelio laŭ sankta Johano ni sciiĝas, ke la homoj serĉis Jesuon en tiu loko, en kiu Jesuo en la antaŭa tago multobligis la panon por nutri kvin mil homojn. Ĉar ĉi tie ili ne trovis Jesuon, do ili ŝipveturis al Kapernaum, serĉante Jesuon. Trovinte Lin, ili miris, kial Li venis ĉi tien. Tiam Jesuo diris al ili: “Vere, vere mi diras al vi, vi min serĉas, ne ĉar vi vidis signojn, sed ĉar vi manĝis el la panoj kaj satiĝis. Laboru ne por la pereema nutraĵo, sed por la nutraĵo, kiu restas ĝis eterna vivo, kiun la Filo de homo donos al vi, ĉar Lin Dio, la Patro, sigelis” (Joh 6, 26-27). La Judoj starigis multajn demandojn kaj Jesuo ĉion klarigis kaj respondis al la demandantoj. Tio estis vere Eŭkaristia parolado.

Jesuo diris: “Mi estas la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo; se iu manĝos el ĉi tiu pano, tiu vivos eterne; kaj la pano, kiun mi donos, estas mia korpo, por la vivo de la mondo” (Joh 6, 51). “Vere, vere, mi diras al vi, se vi ne manĝas la korpon de la Filo de homo kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi vivon. Kiu manĝas mian korpon kaj trinkas mian sangon, tiu havas eternan vivon; kaj mi levos tiun en la lasta tago” (Joh 6, 53-54). Tiel Jesuo parolis en Kapernaum al tiutempaj homoj, al siaj disĉiploj. Kaj Jesuo tion saman diras senĉese, en ĉiu tem-

po. Jesuo riĉa je mizerikordo deziras feliĉon por ĉiu homo.

Plenplena de la kompatema amo al ĉiu homo Li senĉese oferas sin sensange en la Sankta Meso kaj atendas ĉe la Eŭkaristia Tablo “la filojn de Dio, la filojn, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de korpo, nek el volo de homo, sed el Dio” (Joh 1,13). Ĉe la Eŭkaristia Tablo Jesuo atendas la filojn de Dio, alidirite Jesuo atendas tiujn, kiuj estas kun Dio pacigitaj, kiuj havas sanktigan gracon.

Kun ĝojo en la koro, kun kredo kaj espero ni iru al Jesuo Eŭkaristia, al la Trono de Dia Mizerikordo, al la kompatema Koro de Jesuo, al la fonto de la vivo kaj sankteco, al la fonto de ĉiu konsolo. Ni iru al bona, kara Paŝtisto, al la Pano viva, kiu ĉieleliris por konsoli, por fortigi, por ĝojigi nin, por ke ni atingu la vivon eternan.

La homo unuiĝinta kun Kristo havas spiritan potencon, kiu povas fari ion grandiozan, neantaŭvideblan. Pri la Dia Servanto Johano Paŭlo la Dua ni legas en la versaĵo:

Unuiĝinta kun Kristo, Kriston predikanta, li montris la potencon de l’ Eŭkaristio, dum nombran junularon, homamasojn grandajn li altiradis al la Vero, Bono - al Dio.

Prilaboris Zofia Kamieniecka